

Kun Tiburcjusz Tiblewsky: Diskurso pri la metodo de Kartezio

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.05.10.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-169/Radiokasedo-169-10-86-B-1052-Claude-GACOND-kun-Tiburcjusz-Tiblewsky-Diskurso-pri-la-metodo-de-Kartezio.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolas Claude Gacond kaj Tyburcjusz Tyblewski.

Hodiaŭ ni recenzos la verkon Diskurso pri la metodo de Kartezio.

TT.- Aperis tute freŝe la libro, kies aŭtoro starigis lastan punkton en la jaro 1637, do antaŭ 350 jaroj. Eldonis ĝin la impona fervolulo el Brazilo, Gersi Alfredo Bays, kies "Fonto" liveras al ni ne nur la samtitolan beletran revuon, sed ankaŭ serion de gravaj libroj. Kartezio (René Descartes) vivas ĝis nun en konscio de almenaŭ meze klera homo. Tiu sentenca: "Mi pensas, do mi estas" de tempo al tempo memorigas al ĉiu, ke pensi estas ne nur la homa privilegio, sed ĉefe - la tasko.

Por filozofoj Kartezio estas profunda nocio, el kiu devenas radikoj de metafiziko kaj grundo de logika pensado. 350 jaroj estas la tempo, en kiu pereis pli ol unu grava verko. La Kartezia daŭras, respegulata en nuntempeca maniero pensi kaj konkludi, kvankam la verko mem estas konata el resumoj aŭ sentencoj.

Inter esperantistaj filozofoj bonŝance troviĝas d-ro Eŭgeno de Zilah (hungardevena franco), kiu dum jaroj lekciis kaj interpretis Kartezion al studentaro de Metz. Li tradukis la "Diskurson" kaj komentariis ĝin kun eminenta kompetento, videbla en la plej subtilaj detaloj. Mi tuj konfesu: nur nun - la kvindekjarulo - mi tralegis la tutan "Diskurson"; ke tio okazis en esperanto mi dankas al la koncepto de la eldono. Mi elkore dankas al ĉiuj, kiuj ebligis al mi eniri la fonton.

Kiu el ni, eĉ filozofiema, tempas nune por studi la klasikajn verkojn? Kiu el ni sufiĉe pacienas por studi plu, spite al malfacilaĵoj de la teksto? Mi jam ofte ne.

Kaj ĉi tie ni ricevas la libron, kies gravega enhavo preskaŭ hejmiĝas, kaj Kartezio denove flustras siajn saĝecojn. Renkontiĝas du kodoj de rezonado.

Cl.- Kartezio: "Tiel mia intenco ne estas instrui ĉi tie la metodon, kiun ĉiu devas sekvi por bone konduki sian racion, sed nur vidigi kiamaniere mi klopodis konduki la mian...". "Tamen eblas ke mi eraras, Kaj estas nur iom da kupro kaj vitro, kion mi prenas por oro kaj diamantoj..."

TT.- De Zilah: "Ni ne forgesu, ke la 17-a jarcento estis la lasta bona jarcento de la alĥemiistoj, kaj ke Kartezio, dum siaj studoj, trafolumis librojn eĉ pri la plej superstiĉaj kaj pri la plej falsaj sciencoj. Serĉi oron kaj diamanton kaj trovi kupron kaj vitron estas evidenta aludo al alĥemio, ĉi tiu patro de la ĥemio moderna, kiun la eŭropanoj heredis de la araboj".

Kaj tiel en la tuta libro, kies plena titolo ja tekstas: Diskurso pri la metodo por bone gvidi sian racion kaj serĉi la veron en la sciencoj.

Cl.- Kaj la unua frazo: de Kartezio "Se ĉi tiu diskurso ŝajnas tro longa por senhalta ellegado, oni povos ĝin dispartigi en ses partojn..."

TT.- Laŭ deziro de la aŭtoro, d-ro de Zilah ĉiĉeronas nin tra la ses partoj, malkovrante la ideojn kaj konsisterojn, kiuj en la legado de la teksto povis preteratentiĝi. Rapide oni rekonas la majstran manieron gvidi, kio komprenebliĝas des pli, kiam oni ekscias, ke li faris tion sisteme dum 16 jaroj kun sia franca studentaro.

La tradukinto asertas en Antaŭparolo: "Sufiĉas provi...eĉ mallongan tradukon de teksto iom aĝa por ekkonsciiĝi ke oni eĉ ne majstras ...la lingvon de siaj studoj... Nur tre malmultaj homoj, eĉ inter la kleruloj, scipovas ellegi libron en fremda lingvo kun optimuma profito. Eble alvenante al la fino de sia vivo, oni pasive majstradas, pli malpli, keikajn lingvojn...Sekve la postulo de la klera leganto, se li jam akceptis la ideon de Esperanto, estas ekhavi tekston, kiu donas al li la samajn informojn, kiujn donintus la originala teksto, se li majstrintus ties lingvon..."

Mi rekonfesu, ke la Diskurson mi trifoje rekomencadis en traduko poilingva kaj fine mi rezignis. Tiom fremda kaj tiom fora ŝajnis al mi la plejparto de la frazoj. Ĉu kulpis la teda tradukinto? Eble, ĉar nun mi tralegis la tutan libron, kelkfoje revenante al la komentariitaj fragmentoj, kun tiu sento de "optimuma profito", kiu donas al la pensoj la freŝan leĝerecon kaj al la problemoj iun logan facilecon, venkeblan per la racia rezonado. Kaj ni klare konsideru la meriton de de Zilah, kiu kun kompleta respondeco asertis jenon: "Ne nur la riĉeco de la baza radikaro, sed ankaŭ la lingva esenco de Esperanto promesas al nia lingvo florantan estontecon sur la kampoj de la filozofio. La logikeco de esperanta gramatiko, la ebleco senfina de la kunmetaĵoj, la precizeco kaj nuancopleno tie la afiksitaĵoj verboj, la respekto de la etimologio donas al Esperanto la perspektivon fariĝi elstara filozofia lingvo, krom se la timemaj tendencoj por mezaĉigi la lingvon,... fakte la tendencoj al entropio, venkus".

Filozofiaj verkoj - kun sia riĉeco de ideoj - perfekte defendas la lingvon kontraŭ la mezaĉigado. Tion ĉiu povas facile eksperimenti, kiam la libro legita donas la subitan senton de pliriĉiĝo aŭ plivastiĝo, kaj kion garantias ankaŭ la "Diskurso".

Decas aldoni, ke la tradukinto konis dek lingvojn (inkluzive kun kelkaj aziaj) antaŭ eklerni Esperanton.

Kaj nun ni revenu al la fonto mem; al kelkaj karteziaj pensoj:

Cl.- "...mi lernis nenion kredi tro firme el ĉio, kion nur persvadis al mi la ekzemplo kaj la kutimo; kaj tiel mi liberigis min iom post iom de multaj eraroj, kiuj povas malheligi nian naturan lumon kaj igi nin malpli kapablaj por kompreni racie."

"Tial mi neniel povus aprobi tiujn homojn de fuŝema kaj malkvieta humoro, kiuj, destinite nek de sia naskiĝo, nek de sia fato al manipulado de la publikaj aferoj, ade konstantas tie fari, enidee, ian novan reformadon... Neniam mia intenco etendiĝis pli antaŭen ol prizorgi la reformadon de miaj propraj pensoj kaj konstrui sur tereno, kiu estas tute mia."

"Sed simile al la homo, kiu paŝadas sola kaj en tenebro, mi decidis iri tiom malrapide, kaj uzi tiom da singardemo en ĉiuj aferoj ke, eĉ se mi progresus nur malmultege, mi bone detenus min, almenaŭ de falado."

"La unua (leĝo) estis neniam akcepti ion ajn kiel veran, se mi antaŭe ne ekkonis evidente kiel tian: tio estas zorge eviti la trohastadon kaj la antaŭjuĝadon..."

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond kaj Tyburcjusz Tyblewski recenzis la verkon *Diskurso pri la metodo de Kartezio*. Ĝis la venonta sabato!

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014